

Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

[provizora sidejo ĉe :]

Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bühl 16,
Okc.-Germanio.

Numero 14;

- 6 - 11 - 1986
IKEF

*
1984
C

oktobro, 1986.

Ne-fermita letero de la Prezidanto de IKEF:

Estimataj Gekolegoj!

Ĉi tiu Laŭokaza Novaĵletero estas la lasta, kiun verkas nia Ĝen. Sekretario, Lawrence Mee.

Bedaŭrinde, lia emeritiĝo kaj lia ĉeso kiel Estrarano, kiujn mi avizis en mia letero por LN-12, realiĝas pli frue ol mi tiam supozis.

La taskon esti Financa Konsilanto intertempe transprenis S-ro Roland Rotsaert, en Belgio. Sen-dube la kaso estas, ĉe li, bankisto, en kapablaj manoj. Koncerne la taskaron de Ĝ.S., ni ne ankoraŭ faris definitivajn decidojn; kiel provizora solvo, mi deklaris min preta aldone plenumi la rolon, kun certigita helpo de la aliaj Estraranoj.

Lawrence Mee forlasas nun la tribunon de IKEF, fakgrupo kies fondon kaj evoluon li kaj mi kune, energie, antaŭenpuŝis. En la nomo de ĉiuj Membroj de IKEF, - kies nombro nun atingis kvin-deko - kaj ankaŭ en mia propra

nomo, mi kore dankas al li pro lia fervora agado, pro lia sen-laca vervo por IKEF, kaj ankaŭ pro lia kelkfoje akre kritikado, kiu estonte eble mankos je ni.

Mi deziras al Lorenc' por lia 'tria aĝo', bonan novorganizado de la vivo, bonan kaj feliĉigan re-iron al la propra lando, kaj ĉiam bonan sanon. Lorenc' kompreneble restos Membro de IKEF; espereble li iutage denove aktivos por IKEF en speciala afero.

La plej proksima tasko por mi mem estas kompilado de LN-15 ! Se vi havas ion raportindan, aŭ ion kiun vi spertis, sukcese aŭ malsukcese faris aŭ travivis kiu iel rilatas al nia fakgrupa laboro, ĝin bonvolu senhezite raportu al mi. Nia maksimumo estu:
UNU STIMULU LA ALIAJN !

Franz J. Braun.

Prenante la rajton respondi, kaj dankante la Prezidanton pro laŭdaj vortoj, via Ĝenerala Sekretario sentas la devon klarigi, ke li pli meritas riproĉojn ol laŭdojn. Memevidente, li surprenis taskaron preter kapableco ĝin plenumi; memevidente, li malsukcesis en la tasko aparte lasita al Ĝenerala Sekretario, tiu de trejnado de kandidatoj por postenoj ĉu en la Estraro ĉu en aliaj gvidaj roloj;

memevidente, kaj tiel plu.

Ĉu la kerna kaŭzo estas tiu trajto, al kiu la Prezidanto aludas, tio de tro akra kritikado? Ne eblas doni respondon al tiu demando.

Se per tiuj ĉi lastaj (almenaŭ dume!) vortoj, mi sukcesas instigi legantojn al esploro pri la kaŭzo por manko de aktiva laboro por antaŭenigi la agadritmon de la Fakgrupo, mi retiriĝas kun kontento.

La Estraro de IKEF formale kunsidas.

Tri Estraranoj faris agrablan vojaĝon al Belgio dum semajnfino de miksita vetero, por tie okazigi en la domo de kvara Estrarano formalan kunsidon. Matene je la 13-a de septembro, S-ro Braun malfermis la kunsidon, en kiu partoprenis S-rojn Gilbert, Rotsaert kaj Mee; sendis pardonpetojn pro neeblo ĉeesti D-roj Gether kaj Picasso. La Estraro tuj rimarkis, ke la ĉeesto de Estraranoj el kvar apartaj landoj por tiu ĉi la unua vera Estrarkunsido de IKEF, faris notindan eventon el alioke ordinara sabato.

La Estraro traktis longan tagordon, ĝis en la vespero, loka regiontipa restoracio hejmgigis nin por agrabla festvespermanĝo.

Neniu punkto sur la tagordo estis rutina afero; viaj Estraranoj vere laboris dum tiu tago. Sed la rezultoj estas valoraj por ni ĉiuj.

La kunveno en Pekino.

Ni donu la unuan mencion al raporto, kiun donis la Prezidanto, pri la IKEF-a kunveno dum la UK en Pekino. Krom konfirmante la viglecon de la diskuto, al kiu D-ro Gether aludis en la formala raporto, S-ro Braun donis la tre plezurigan informon, ke eĉ sesa Membro de IKEF partoprenis en la kunveno. Tiu Membro estas F-lino Ĝirin Ahmad-Nia, el Tehrano, (IKEF-16), pri kiu revuo Heroldo poste aperigis portreton kun la epiteto: la plej bela kongresanino. La Estraro rigardis fotografajojn kaj konfirmis tiun verdikton!

Financa Konsilanto.

Grava tasko por la Estrarkunsido estis formaligi la transdonon de la taskaro de Financa Konsilanto al S-ro Roland Rotsaert. Tiel okazis. S-ro Rotsaert ricevis ĉiujn dokumentojn kaj kon-

firmis la ĝustecon de la sumo de la havaĵoj de la Fakgrupo. La Estraro aprobis la transiron al la belga franko por esti la valuto de la Fakgrupo, kaj fiksis la kotizon por esti 400 b.fr. jare. La Estraro aprobis la malfermon de kuranta konto ĉe la belga poŝtĉekinstanco, kaj simile pri persona konto ĉe UEA.

Raportoj pri la evoluo de la financa stato de IKEF venos ekkon nun el la plumo de S-ro Rotsaert, kaj al li ekde nun iros ĉiuj informoj pri Membreco.

Ĝenerala Sekretario.

La Estraro longe diskutis la problemon de la posteno de Ĝenerala Sekretario. S-ro Mee klarigis la plurajn premojn sur li, kiuj devigas la baldaŭan eksigon el la posteno, almenaŭ dum periodo de kelkaj monatoj; la Estraro konstatis kun bedaŭro, ke neniu Membro troviĝas por transpreni la taskaron.

Kiel provizora solvo, S-ro Braun konsentis akcepti la titolon de Ĝ.S. por eviti la konstataĵon, ke la posteno vakas; S-ro Mee demisios la taskon je la 1-a de novembro. S-ro Gilbert konsentis akcepti la respondecon prirespondi leterojn aliajn ol informoj, laŭbezono.

Kunlaboro kun H.E.-A.

Ligite kun tiu problemo, la Estraro notis kun kontento proponon de kunlaboro flanke de la Ekonomikista Grupo de la Hungara E.-Asocio, (la Grupo estas Membro de IKEF), kaj decidis kiel eble plej multe utiligi tiun kunlaboron.

La Peranta reto.

La Estraro donis varman aprobon al la starigo de reto de Perantoj de IKEF, kaj aprobis la labormetodojn proponitajn de S-ro

Mee. Espereble, la ekzisto de tiu reto kondukos al pli efika varbado de novaj Membroj, kaj al pli oftaj mencioj de la Fakgrupo en landaj aŭ regionaj gazetoj.

La Estraro varme aprobis la ekfunkcion de la sistemo aperigi identecĉildojn de Membroj, kaj rekomendas ĝin kiel gravan paŝon por la Fakgrupo.

Terminologia laboro.

La Estraro donis ĉefan atenton al la ĉefa agadpunkto de la Fakgrupo, tiu de terminologia laboro, kaj decidis, ke la afero estas tiel grava, ke en ĉiu kazo de la LN-o devas aperi raporton pri la evoluo de la afero. Pro la graveco de la agado, la Estraro prenis decidon, ankaŭ, ke la Fakgrupo tenu la principon, ke ĉiuj kostoj de tiu terminologia laboro estu ŝarĝo sur la komuna kaso, kaj ke aktivaj kunlaborantoj finfine ricevu porcion de la financa gajno el eldonagado sekve de kunmeto de vortaroj en la diversaj fakoj.

Ligite kun tiu temo de terminologia laboro, la Estraro notis kun kontento la evoluon de la tradukreto, proponita lastatempe en Francio, kaj decidis, ke subtenado de tiu iniciato plene kongruas kun la agadprogramo de nia Fakgrupo.

lm

- - - - - oOo - - - - -

Respondeca redaktoro kaj eldonanto de tiu ĉi laŭokaza Novaĵletero estas S-ro Lawrence Mee, ĉe adreso: Postbus 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Legantoj estas petataj bonvolu noti, ke tiu adreso ĉesos esti valida je la 16-a de novembro, 1986.

Limdato por la proksima Novaĵletero estos la 15-a de decembro, ĉe la adreso de la Prezidanto de IKEF, S-ro F.J. Braun. (Vidu la liston de Perantoj.)

ADMINISTRADO

La Financa Konsilanto sciigas:

IKEF nun havas propran konton en la belga poŝtĉekinstanco. Eblas fari rektan pagon el iu lando al:

Poŝtĉekkonto 000-1592629-83.

La nomo, sub kiu la pĉk estas tenata, estas:

IKEF, p.a. S-ro Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, Belgio.

La jarkotizo estas nun 400 belgaj frankoj; Dumviva Membreco ankoraŭ eblas je la kosto de dudek-oble la jarkotizo, aŭ 8 000 belgaj frankoj.

IKEF nun havas personan konton ĉe UEA en Rotterdam. Pago de jarkotizo de 20 guldenoj eblas por tiuj, kiuj simile tenas konton ĉe UEA. La nomo de la konto estas IKEF, kaj la kontokodo estas 'ikef-c'.

-oOo-

La Perantoj de IKEF estas:

Britio:
S-ro P. Foss,
Long House Hotel,
Pilton, Som., BA4 4BP;

Francio:
S-ro F.-X. Gilbert,
Vert Coteau,
Longeville-en-Barrois,
55000 Bar-le-Duc;
(CCP 1275-89 L Nancy);

Okc.-Germanio:
S-ro F.J. Braun,
Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bühl 16;
(Volksbank Bühl 713104 -
BLZ 66281400);

Italio:
D-ro M. Picasso,
via De Gasperi 7,
20057 Veduggio al Lambro;

Jugoslavio:
S-ro S. Taleski,
ul. 'Oslo' br 12,
91000 Skopje.

INTERKONATIĜO

Ĉi-foje ni bonvenigas nur du novajn Membrojn al nia listo, sed kiel kutime ni bonvenigas ilin kun granda plezuro, esperante, ke por ili membreco alportos ion apartan. Ni notu kun plezuro, ke la nombro de nomoj en nia listo nun superas kvindek, dum la nombro de landoj en kiuj troviĝas niaj Membroj plialtiĝis al dudek unu.

Membro-listo je 1986 - 10 - 15.

- 50 Cwik, S-ro Michael, ekonomiisto ĉe la Eŭropa Komunumo;
Avenue de Tervuren 175, 1040 Brussel, Belgio;
- 51 Szabó, S-ro József, ekonomiisto;
Dr. Csanádi krt. 15-17, T/15, 5000 Szolnok, Hungario.

Kiel kutime, ni petas sciigon pri iuj ajn eraroj de detaloj en publikigitaj informoj pri niaj Membroj.

-oOo-

En la nomo de la ceteraj Membroj, ni esprimas bondezirojn por tri el niaj Membroj, kiuj lastatempe prenis paŝojn en novaj karieroj.

S-ro Hans Deseure, (IKEF-38), iris, ne kun aparta plezuro ni konstati, soldatservi por periodo de ok monatoj, post sukcesa trapaso de ekzamenoj. Ni gratulas, sed kompatas ...

S-ro John Rapley, (IKEF-6), elmigris al Nov-Zelando, por tie proponi profesiajn servojn kiel konsultisto en la kampo de kontotenado kaj rilatataj traktaĵoj. Ni volas plenan sukceson sub ĉiam agrabla klimato.

S-ro Paul Seesink, (IKEF-33), devigita forlasi entreprenon kiu ĉesis komerci, rapide trovis novan postenon en la sama profesio, tiu de mebligado de komercaj konstruaĵoj. Antaŭvidite nun estas specialigado en mebligado de bankaj haloj, kaj ni esperas por li ĉian specon de sukceso.

-oOo-

Interŝanĝo de ideoj -- terminologia laboro.

Ĉi-foje ni ne kvazaŭ pardonpetas pro tio, ke diskuto pri terminologia laboro estu la ĉefa punkto en la interŝanĝo de ideoj. La Estraro plene agnoskas, ke tiu ĉi, la ĉefa punkto sur nia agadplano, meritas okupi pli grandan spacon en niaj Novajletero.

Kun bedaŭro, tamen, ni konstatas, ke neniu reago venis de Membro de IKEF al la aludoj en la lasta LN-o; aparte: neniu plia Membro ĝis nun respondis per promeso aktive kunlabori. De la Prezidanto de la Akademio de Esperanto venis reago bonvenigante la sintenon de IKEF, kaj invitante pli-malpli formalan aliĝon, flanke de IKEF, al la laboro de la Akademio. La letero atentigis pri la relative malforta stato de la kaso de la Akademio, kaj rekte invitis mondonacojn. Ni varme rekomendas, ke vi memoru tiun peton kiam vi pagos vian kotizon por la proksima jaro; aldoni kroman pagon por esti donaco al la Akademio estus relative sendolora metodo montri vian subtenon, ne nur por la Fakgrupo je kiu vi estas Membro sed ankaŭ por la valora laboro de la Akademio, zorgante pri racia evoluigo de la lingvo kiu estas nia komuna ligilo.

La Estraro de IKEF longe diskutis la temon de terminologia laboro dum la lastatempa kunsido, kaj donis plenan aprobon al la sinteno tenita ĝis nun. La ideoj pri laborplano por la Fakgrupo pli konkretiĝis, kvankam ankoraŭ mankas sufiĉe da sinproponoj por aktiva kunlaborado.

Nova Membro de IKEF, S-ro M. Cwik, (IKEF-50), transdonis ekzempleron de la naŭ-lingva terminaro de la Eŭropa Komunumo, (ni nomu ĝin: la eka terminaro), kaj S-ro Braun montris ekzempleron de la Ŝlosilvorta terminaro de la eldonejo, ICC, (ni nomu ĝin: la icocaa terminaro; aludo al ĝi troviĝas en LN-o 12). La Estraro kritike kontrolis ambaŭ verk-

ojn, komparante ilin, kaj kun la Komerca Vortaro de Kreuz kaj Mazzolini, kaj kun la IKEV de Munniksma kaj kunlaborantoj. Interkonsentite post diskuto estas laborplano kiel sekvas nun.

Nia unua celo estas proponi, kiel pluan lingvon, Esperanton al la kompilintoj, kaj de la eka terminaro kaj de la icocaa terminaro. La bazo de la laboro estos la eka terminaro, kun daŭra kontrolado de la tuto uzante aliajn fakajn vortarojn.

Por atingi la celon, bezonata estas teamo de korespondantoj en ĉiuj el la lingvoj uzataj en la EK-o, kaj kunordiganto de la laboro. Necesas iel ebligi fojajn renkontiĝojn de la membroj de la teamo kun la kunordiganto; laŭeble, ĉiuj kostoj de materialoj kaj afranko iros al la ŝarĝo de la kaso de IKEF.

Jen, en du alineoj, la kerno de la laborplano de la Estraro.

Por komenci la laboron.

Por ebligi komenciĝon de la laboro necesas stopi kelkajn truojn jam konstateblajn. Eble la plej urĝa manko estas tiu de kunordiganto, kiu prefere estu Membro de IKEF, sed ne nepre estu Estrarano nek sperta lingvisto; la plej bezonata trajto estas tiu de lerta organizanto kiu tamen plene regas nian lingvon kaj disponas pri skribaĵo ekipita por nia lingvo.

Eble egale urĝa afero estas manko de mono en la kaso de IKEF, mono dediĉita al tiu ĉi agado. La Estraro proponas tri eblecojn por niaj Membroj kaj aliaj legantoj.

Donaceblecoj.

Por tiuj, kiuj ne disponas pri la tempo, ktp, por ebligi aktivan partoprenon en la agado, ni rekomendas la faron de mondon-

aco por montri subtenon por tiuj kiuj ja povas aktive partopreni. Ĉar en la unuaj ŝtupoj la bezono de mono estas por aĉeti la bezonatajn fakajn vortarojn, donacado de tiaj vortaroj estos egale valora por la agado. Aparte pripensinda estas la donaco de la verko, Int. Komerca-Ekonomikista Vortaro, (IKEV), de Munniksma, ĉar dum longe nun tiu verko estas ne plu havebla. Tuj legantoj, kiuj disponas pri (ne-plu-bezonataj) fakaj vortaroj, estas petataj promesi nun la donacon de ili por uzado flanke de la kunlaborantoj. (Sciigon de la promeso estu farata per poŝtkarto aŭ letero al S-ro Braun, ĉe la konata adreso en Bühl, ni petas.)

Antaŭmendoj bonvenigataj.

La tria ebleco estas 'antaŭmendi' ekzempleron de la terminaro kiu estos la rezulto de la laboro. Pagoj nun de la ekvivalento de, ni diru, kvindek guldonoj aŭ mil belgaj frankoj kvazaŭ certigus la liveron de ekzemplero de la terminaro. Tiaj pagoj estus konservataj en la kaso, por esti la baza kapitalo por finfina eldonlaboro; laŭeble la mono liverus rentumon al la kaso por ebligi daŭrigon de la laboro. Kaj nenio malhelpas, ke 'mendanto' ankaŭ faru donacon, laŭdezire kaj laŭpove.

Jam pli frue ni aludis al la alia manko, tiu de kunlaborantoj. Klarajn promesojn kunlabori ni jam delonge havas de Ak-o Werner Bormann kaj S-ro Hans Wiersch, ambaŭ en Okcidenta-Germanio, kaj de S-ro Paweł Wimmer, en Pollando, (kiu tamen ne estas Membro de IKEF); de aliaj Membroj ni ricevis esprimojn de subteno sed kun bedaŭro, ke aktiva kunlaborado ne, aŭ provizore ne, eblas.

Kunlaborantoj bezonataj.

Por starigi veran teamon, ni bezonas kunlaborantojn el aliaj lingvo-regionoj, kaj en tuto, pli da kunlaborantoj. Minimume ni devas arigi teamon el ĉiuj el la naŭ lingvo-regionoj de la Eŭropa komunumo, ĉar alie ni ne povos

bone atingi nian unuan celon, sed efektive ni ankoraŭ ne havas membrojn en du el tiuj regionoj, tiuj de Greklando kaj Portugalio.

Ni do frontas la enigmon: kial niaj Membroj ne sinanoncas por terminologia laboro?

Ĉar eble la respondo estas pro timo de nekompetenteco en la laboro, ni surpaperigas nun pensojn pri la kvalitoj bezonataj.

La ĉefa bezono estas liberaj horoj, pli-malpli regule disponeblaj, dediĉotaj tamen al studado de fakaj artikoloj en la nacia lingvo, kun samtempa kontrolado de terminoj en la internacia lingvo. Sekve, iu pli ol ordinara intereso en etimologio grande helpus en la laboro.

Aŭtodidakta instruado.

Se oni disponas pri la liberaj horoj, aŭtodidakta instruado en etimologio estas facila afero: nepre bezonataj estas la verko, la Fundamento de Esperanto; la verko, Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento; la verko, Plena Gramatiko de Esperanto, kaj la verkoj, la Aktoj de la Akademio, 1963-1967 kaj 1968-1974. Grande helpus, se la studanto disponus pri la Slipara Vortaro de la TC de ISAE, kaj pri la serio, Akademaj Studoj, 1983 - 1986, sed tiuj lastaj ne estas nepraĵoj.

El la tuto, la studanto rapide akirus la konstaton, ke terminologia laboro temas ne pri terminoj sed pri difinoj. La komu laboro estas interkonsenti pri la difino, (en Eo), por iu faka nocio, el kiu interkonsento facile venus taŭga termino, sekvante la instruojn en la libroj menciitaj. Nenio en tio estas malfacila, sed ja emfazendas, ke la ĉefa bezono estas liberaj horoj.

Se la E.-Movado disponus pri sufiĉe da mono por salajrigi malgrandan teamon, la tasko estus tre facila afero. Ni konstatu denove, ke tiu manko de mono estas rekta sekvo de la hezitemo, flanke de adeptoj, fari aĉetojn

de eĉ ekzistantaj eldonadoj; ĉar vendoj ne okazas, la gajno el la vendoj ne realiĝas; ĉar gajno ne venas el la agado, tiu agado lamas; ĉar la eldonagado lamas, la 'ekstera mondo', (kiu estas ĉiaokaze skeptika pri niaj pretendoj), konvinkiĝas, ke Eo estas afero ligita ĉiam kun malsukcesoj; ĉar ni ne gajnas sufiĉe da novaj adeptoj el tiu 'ekstera mondo', niaj propraj laboroj pli kaj pli ofte ĉesas doni al ni kontentigon; malfacile estas resti optimisma pri la estonteco.

Sed, tamen, agadoj de aliaj instancoj ja donas al ni kaŭzojn resti optimismaj. Ni jam rekomendis al niaj legantoj la iniciaton de S-ro Claude Bodson, en Clary, Francio, proponi la starigon de tutmonda tradukreto.

Lastatempe venis al ni la sciigon, ke tiu tradukreto jam havas kunlaborantojn en dudek tri landoj. En kvar el tiuj landoj, la tradukreto estas jam organizita tiel, ke oni konstatas la ekziston de loka asocio. Du el tiuj kunlaborantoj estas Membroj de IKEF. Inter la celoj de la tradukreto estas - kompreneble! - eldonado de teknikaj, (ni legu: fakaj), vortaroj.

Ni restu optimismaj.

Memorigante pri la iniciato starigi terminologian centron en Budapeŝto, ni ne povas eviti la konstaton, ke la laborfortoj por faka laboro en la terminologia kampo pli kaj pli grandigas.

Nia kontribuo ne estas kerne valora al la tuto, sed en niaj propraj fakoj de komerco kaj ekonomiko ni sendube okupas ŝlosilan lokon. Gravus, ke ankaŭ ni arigu sufiĉe fortan teamon por tiu laboro.

lm

- - - - - oOo - - - - -

Majstraj vortoj.

Fragmentoj el la Festparolado de D-ro L. L. Zamenhof, ĉe la kvara Kongreso de Esperanto, 1908, en Dresdeno.

...

Niaj pioniroj laboris, kaj la afero kreskis. Baldaŭ ni ĉiam pli kaj pli akiradis la konvinkon, ke de teoriistoj ni devas atendi tre malmulte da bono por nia afero; ke ĉiuj laŭdoj kaj mallaŭdoj de flankaj personoj havas por ni nur tre malgrandan signifon; ke ni devas fidi nur niajn proprajn fortojn, nian propran paciencon kaj konstatecon; ke la mondo venos al ni nur tiam, kiam ĝi vidos en ni potencon, kiam ĝi vidos, ke ni ne palpas en mallumo, ke ni ne perdas hodiaŭ, kion ni akiris hieraŭ, ke nia vojo estas klara kaj rekta kaj ni de ĝi neniam deflankiĝas.

Sed ne per nur unu fojo ni venis al tiu fortika konvinko. En la unua tempo, ... nia afero progresis tre malrapide kaj malfacile. ... Nun ni atingis tian potencon, pri kiu multaj el ni ... ne kuragiĝis eĉ revii, kaj se ni marŝos ... kiel ĝis nun, ... ni plene atingos nian celon.

...

-oOo-

El: letero de D-ro L.L. Zamenhof, al Societo Espero, Sentspeterburgo, okaze de la oficialiĝo de la societo. (Datumita je 1892 - 04-23.)

...

Mi ne scias, kiaj estas viaj planoj por la estonteco, sed mi pensas ke antaŭ ĉio vi devas per ĉiuj fortoj peni fondi solidan kason, ĉar por sukcesoj en nia afero, tiel same kiel por milito, "estas necesaj tri objektoj: mono, mono kaj mono".

...

-oOo-

Ambaŭ citaĵoj estas prenitaj kun sento de danko el la verko:

Originala Verkaro de L.L. Zamenhof.
Leipzig; F. Hirt & Sohn; 1929.
Kolektitaj kaj ordigitaj de
D-ro Joh. Dietherle.

-oOo-

IDENTECŜILDOJ

T.S. Lee, Hong Kong,
(GPO Box 11992), Hongkongo.
(tel.: 0-6994511 aŭ 0-6989834;
telekso: 39872 FOLEX HX.)

- reprezentanto kaj agento;
 - lingvaj eblecoj: angla, ĉina, indonezia;
 - eksportaj deziroj-eblecoj: ĝeneralaj varoj de Hongkongo kaj Ĉinio; metalaj pecoj por industrio, fabrikotaj laŭ proponitaj desegnaĵoj; industriaj ekipaĵoj;
 - rilatoj: kun importistoj kaj industriistoj;
- specialaj servoj Esperantistaj:
akcepti mendojn de Esperanto-Asocioj manufakturi insignojn kaj Esperantaĵojn.

F.J. Braun, 7580 Bühl 16,
(Hornisgrindstr. 8),
Okc.-Germanio.

- aĉetsekcio en industria entrepreno, (elektroteknika);
- lingvaj eblecoj: germana, angla, franca;
- kompetenteco: industria komercisto; aĉeti krudmaterialojn, pecojn kaj aliajn varojn por la produktado de elektromotoroj; konsili pri racia materialfluado en industrio; kvalifikita kontotenisto;
- eksportaj deziroj-eblecoj: malalttensiaj elektromotoroj kaj rilatataj iloj;
- importaj eblecoj: elektrikaj kaj elektronikaj pecoj kiel mecoj, kondensatoroj, ĉokiloj, reostatoj; ŝtanĉitaj, tornitaj kaj mulditaj pecoj, el ŝtalo, aluminio, zinko, ktp; plastaj kaj kaŭĉukaj pecoj, diversformaj; ŝraŭboj kaj ŝraŭbingoj; sintritaĵoj; lagroj, kablaĵoj, feritaĵoj kaj karbonaj brosoj; diversaj iloj kaj maŝinoj;
- rilatoj: kun industriistoj ĉiuspecaj; kun la aŭtomobil-industrio ĝenerale.

glosaro: vidu la dekstran kolumnon.

Hans Wiersch, 7063 Welzheim,
(Tilsita Strato 39),
Okc.-Germanio.

- emerita eksperto pri specialaj konstrumaterialoj; leksikografo: verkisto de libro pri parolturnoj, germana-Eo;
- lingvaj eblecoj: franca, angla, itala, retiromanĉa;
- sinproponanto por terminologia laboro ene de IKEF.

glosaro:

meco: mikroelektronika cirkvitario;

ĉoki: per tiucele desegnita elektromagneto mildigi perturbojn en elektronika cirkvito;

ferito: vd. Slipara Vortaro de ISAE.

De Radio Vieno, kiu regule aludas al la Fakgrupo dum elsendoj en Esperanto, ni ofte ricevas interesajn informerojn.

Lastatempe venis du aludoj:

al la ĉiam vizitinda Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Tiu muzeo, kiu proksimjare celebros sesdek jarojn de servado al la E.-publiko, nun disponas pri pli ol 13 000 volumoj, ne mencia la multajn ekzemplerojn de periodaĵoj.

La adreso por informpetoj estas:
Internca Esperanto-Muzeo,
Hofburg, 1010 Wien, Aŭstrio;

al la ne-sufiĉe-bone-konata frata fakasocio, la Tutmonda Esperanta Biblioteka Asocio, (TEBA). Tiu asocio, kiu proponas konsilojn pri labormetodoj bezonataj por prizorgado de Esperanto-biblioteko, okupiĝas ankaŭ pri terminologia laboro en sia propra fako. Sendube estus bona aranĝo, se niaj streboj kunkurus.

La adreso por informpetoj estas:
TEBA, 140 Holland Park Avenue,
London, W11 4UF, Britio.

Okazaj informerojLa signifo de Financaj Raportoj.

"Neniu membro de la societo komprenus tian metodon de kontotenado," oni diris al mi lastatempe. Malvolonte, mi agnoskis la pravon de la aserto.

Private, mi diris al mi mem: "Eĉ vi, estimata Sinjoro Kasisto, ne komprenas kontotenadon, laŭ tiu ĉi aŭ iu alia metodo."

La okazo estis, por mi, nur laŭasta en longa listo de okazoj, kiam mi provis frontigi Kasistojn al la malkonsilindeco prezenti al la societo simplan 'Kasraporton', anstataŭ prezenti taŭgan Financan Raporton pri la jaro de agado. Versajne mi neniam komprenos la pensmanieron, kiu devigas al Esperantistoj rifuzi akcepti la normojn de la 'ekstera mondo', kvankam provante akceptigi nian genian eltrovaĵon de internacia lingvo al tiu sama 'ekstera mondo'. Al tiu, por nia afero skeptika, mondo, jarfina raporto pri la en-kaj elfluado de mono dum la ĵuspasinta jaro devas prezenti klaran, facile kompreneblan raporton pri du apartaj demandoj.

La unua demando estas: ĉu en la ĵusfinita jaro, la (koncerna) societo spertis pli da rimedoj financaj, (enspezoj), ol kostoj, (elspezoj), aŭ inverse?

La dua demando estas: ĉu, en la lasta tago de la (koncerna) jaro de agado, la societo disponis pri sufiĉe da havaĵoj, (de mono, ekipaĵoj kaj simile), por daŭrigi dum plua jaro laŭ simila stilo? Se la respondo al tiu ĉi dua demando estas malfacile konstatabla por laikoj, ĉu la Financa Konsilanto aldonis raporton en vortoj, por helpi al tiuj laikoj kompreni la signifon de la jarfina stato?

Jen, do, ni starigas la neceson por tri apartaj raportoj, kiuj, en tuto, konsistigas la

'Financan Raporton por la ĵusfinita jaro'. (Parenteze ni notu, ke precize tiu vortumado ne estas devige, se la esenco de la situacio estas donata per aliaj vortoj.)

La tri raportoj estas:

1-e - komentario de la Financa Konsilanto, (versajne kun antaŭa aprobo de la Estraro), pri la 'globa' stato de la financoj de la societo;

2-e - Spezokonto pri la kostoj kaj rimedoj spertitaj dum la jaro de la raporto, (prefere kun komparaj ciferoj por la laste antaŭa jaro), kaj

3-e - Bilanco, je la lasta tago de la koncerna jaro, (prefere kun komparaj ciferoj por la laste antaŭa jaro).

La societo neniel hontu, mi konsilas, prezentante ciferojn pri si mem en maniero taŭga por kontentigi personojn, kiuj ne estas membroj, kiuj eĉ ne estas Esperantistoj; la Financa Raporto povus esti tre utila armilo dum varbado!

Ni komprenu, tamen, ke kontotenado por E.-Societo certe havas ecojn apartajn, ne spertitajn dum kontotenado por entrepreno, kaj malofte spertitajn eĉ en aliaj societoj de libervolaj samcelanoj. La klasika metodo de kontotenado plene taŭgas por ĉiuj tiaj cirkonstancoj, inkluzive de la nia, sed valoras preni tempon studi la apartajn ecojn kaj kompreni la metodon taŭge trakti ilin.

Personaj kontoj.

La unua aparta kazo estas tiu de personaj kontoj, por membroj kiuj deponas monon en anticipo de posta uzado. (La 'ekstera mondo' bone konas la kazon de personaj kontoj, kaj de ŝuldantoj kaj de liverantoj de varoj aŭ servoj,

sed personaj kontoj de kreditoroj estas konataj nur en bankoj aŭ en similaj instancoj. En Esperantujo, la fenomeno estas konata en preskaŭ ĉiuj libroservoj kaj eldonejoj, krom en la internaciaj fakaj asocioj.)

Por trakti kun personaj kontoj, nenia ŝanĝo en la metodo de kontotenado estas bezonata, sed la tasko certe devigas al la Kasisto esti pli ol ordinare diligenta. Krome, ĝi nepre enkondukas iom da burokrataj reguloj, pri plena subskribo ĉe 'mendo' aŭ simile, kaj tio postulas ankaŭ plenan komprenon ĉe la flanko de la membro koncernata.

Kotizoj antaŭpagitaj.

Ligite kun la kazo de personaj kontoj estas tio de antaŭpago de kotizoj, foje por pluraj jaroj en anticipo. Bezonata tiam estas kroma konto en la kontaro, konto en kiu registri la traktadojn. Pli grave estas kompreno, flanke de la Kasisto, pri la detaloj de la rutino trakti tiajn okazadojn. Memkompreneble, la koncerna konto montras kreditan saldon, kiu aperas sub Pasivo en la Bilanco. Frue en la nova jaro, la Kasisto, per serio de du-flankaj traktaĵoj, transportas sumojn ekvivalentajn al la koncernaj kotizoj el tiu konto al la konto por kotizoj. En la kazo de plurjara antaŭpago, nur unu kotizo estas tiel transportita; kredito por la ceteraj jaroj restas en la konto por antaŭpagitaj kotizoj. Tre similaj agoj estas necesaj pro la kredito en la konto, Kapitalo pro Dumvivaj Membroj.

En ambaŭ kazoj, la ekzisto de konsiderinde granda kredita saldo, ne bezonata por la kuranta jaro, foje levas la demandon pri atribuo de rentumo, sed tia diskuto estas preter la temo de la nuna raporto.

Jarfina komentario.

Dum kompilado de la komentario jarfina, la Kasisto rajtas altiri atenton al la kreditaj saldoj en

tiuj ĉi du kontoj, ĉar tiaj antaŭpagoj rekte montras la fidon ĉe la koncernaj membroj en la estonteco de la asocio. Malfacile oni povas imagi pli klaran metodon montri subtenon por la Est-raro kaj por la asocio, aparte, kaj por la E.-Movado ĝenerale, flanke de membro, ol pagi kotizojn en anticipo.

Subtenaj Fondaĵoj.

Sed alia, ankaŭ grava, metodo ofte ekzistas en internaciaj fakaj asocioj; ankaŭ ĝi neniel rilatas al la mondo de entreprenoj. Tiu ĉi estas la kazo de la 'Subtena Fondaĵo', aparta kazo ene de la asocia kazo.

Kreditoj al la Fondaĵo venas en la formo de donacoj de membroj; la debetoj estas transpagoj al la konto de kotizoj, por pagi kotizojn de membroj, kutime en evoluantaj landoj, kiuj ne spertas eblecon mem transpagi monon. Sufiĉe ofte, tiu konto ne ricevas mencion en la Bilanco, ĉar la saldo estas nulo post pago de la kotizoj, sed saĝa Kasisto trovas metodon menciigi ĝin en la komentario, por allogi pliajn donacojn en la proksima jaro.

Asocia kapitalo.

La lasta, aparte menciinda, ero en la financa raporto, estas tiu de la Asocia kapitalo. Estas konate, ke multaj Esperantistoj malŝatas la ekziston de kapitalo en la Movado, sed se ni pretas agnoski la genion de L.L. Zamenhof en la kreado de la lingvo, kial ni ne agnosku ankaŭ alian klarvidon koncerne potenco kaj mono? Certe estas, ke al skeptikulo en la 'ekstera mondo', asocio kiu ne disponas pri kapitalo ne meritas multan atenton; se la koncerna asocio estas Esperanto-societo, ni ne miru se la skeptikulo akirus la sintenon, ke ankaŭ Esperanto ne meritas atenton. Niaj Kasistoj portas gravegan ŝarĝon! Ordinaraĵoj membroj nepre atentu pri Financaj Raportoj!

lm

... foje floro velkas.

Frue en la printempo de 1976, la Komerca Ĉambro en Roterdamo akceptis, kun hezito, peton registri novan kompanion. La heziton kaŭzis io nekutima en tiaj petoj: oni volis uzi lingvon alian ol la nederlanda por la nomo de la kompanio. La alparolata komizo devis preni konsilon de superranga komizo, sed li ricevis permeson akcepti la peton.

Sekvis diskuto pri la vortumado de la nomo. La proponita nomo estas: Mondkomerca Eldonejo Esperantista. Ne vere necesis klarigi, ke la lingvo estas Esperanto, sed jes necesis klarigi kiun vorton havas la signifon de 'kompanio', aŭ simile. Eĉ tiam la nomo ne plene kontentigis la regulojn por tia afero: necesis aldoni ion por iel ligi la kompanion kun persono. Post taŭga klarigo, la komizo akceptis la aldonon de, en krampoj: (Ges-roj Mee).

Tiel 'naskiĝis' entrepreno verŝajne unika en la mondo, ĉar plene registrita en maniero, kiu kontentigus ĉian bezonon de la leĝaro de Nederlando, sed kun nomo en la internacia lingvo.

La vortumado de tiu nomo ne rezultis el blinda hazardo; la komencliteroj de 'eldonejo' kaj 'Esperantista' preskaŭ devigis la elekton de alia vorto kun 'm' por la komenclitero, sed por elpensi vorton kiu povus rekte pensigi pri komerco ja postulis cerbumadon.

Nomo kiu pensigus pri komerco necesis esti la celo de la eldonejo estas ofertita al la mondo komercajn bezonaĵojn en la internacia lingvo. La unua, kaj dum la postaj dek jaroj la ĉefa, eldonaĵo estas internacia kvitanclibro. Aliaj komercaj formularoj sekvis de tempo al tempo; el ili la konto-karto kaj kasraporto por librotenado estas la plej bone konataj.

Eldonaĵo de alia tipo estas la verko, La Baza Kurso en Esperanto, de S-rino Childs-Mee, en 1979, kaj, iom poste, la infanlibro, La Geknaboj de Kastelo Grez-ijono, de la sama aŭtorino.

Ankoraŭ en la kampo de komerco, la eldonejo ofertis profesiajn servojn en kontotenado kaj financa konsultado ĝenerale, kaj estiĝis la ĉefa instiganto por uzado de la Stelo, la stabilvalora monokaj kalkul-unuo de Esperantujo, unue proponita de Universala Ligo.

Unu fenomeno estis spertita en ĉiuj el tiuj kampoj: tre malrapida vendo-ritmo. Neniu eldonaĵo vendiĝis sufiĉe rapide por vere kontribui iun komercan gajnon. Unu propono, tiu de komputoro plene funkciebla en la internacia lingvo, neniam progresis preter la etapo de propono, pro preskaŭ absoluta manko de reagoj, spite de pluraj subtenaj aludoj en la E.-gazetaro. Iom post iom, la kapitalo malaperis en kovrado de la ne-eviteblaj kostoj. Danke nur al tio ĉi, ke la laborloko por la eldonejo kostis nenion, la formango de la kapitalo povis daŭri dum dek jaroj.

Lastatempe, tiu senkosta laborejo devis malaperi for: la urba instanco de Roterdamo intencas malkonstrui la konstruaĵon, sub projekto por urba renovigado. La tagoj de Mondkomerca Eldonejo Esperantista, (Ges-roj Mee), estas nombritaj; la lastaj negocoj estas jam akceptitaj, kaj la entrepreno perdos sian ekziston je la 15-a de novembro.

Dum dek kaj duono jaroj, tiu malforta floro, unikaĵo laŭ pluraj vidpunktoj, provis burĝoni sed neniam vere sukcesis. Nun eĉ la kelkaj petaloj kiujn ĝi sukcesis montri al la mondo velkadas. Verŝajne dum iom pli da tempo ankoraŭ malkovriĝos specimenoj de la internacia kvitanclipo, sed baldaŭ la nura restaĵo estos kelkaj aludoj en malnovaj Jarlibroj de UEA.

Onidiro en Britio estas, ke ne-nombrablaj floroj velkadas ne rigardite; almenaŭ tiu ĉi floro velkadas kun rigardantoj.

Lawrence Mee,
pli bone konate kiel
Lorenc' Mi.

Rotterdam,
1986-10-12.

Reklamtarifoj:

a) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive
s e s linioj: senpage;

por pli longaj anoncetoj:
po 1 resp. irpk, (irpk),
por ĉiuj komenciĝantaj ses
linioj de 27 literospacoj.
Ĉiam: unuope mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ
por ĉiuj tri milimetroj de
longeco, enkadrigita,
sed kun minimumo de ok
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.
Por anoncoj je pli granda
larĝeco ol unu kolumno:
laŭ aparta interkonsento.
Ĉiam: tri aperoj de la sama
anonco en sinsekvaj kajeroj
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 1,00 gld.

Nia atento kaptiĝis lastatempe
per:

" ... la iom agresema sinteno
normale trovita en komerco, estas
precize tio bezonata por vendado
de nia varo, tiu de translingvo-
lima komunikado. "

atribuita al:
Prof. Helmar Franck.

----- oOo -----

Legantoj sendube memoras, ke
antaŭ iom da tempo ni aperigis
mallongan aludon al preparaĵo,
nomita 'Antitab', kiu povas helpi
al tabakfumantoj kiuj volas ĉesi
la kutimon. Poste ni aŭdis de
la proponintoj, ke reagoj atingis
ilin pro tiu nia aludo.

Lastatempe, tiuj proponintoj
sendis al ni tri-koloran afiŝeton
pri la preparaĵo, kaj invitis al
ni proponi nomojn de Membroj,
kiuj volas ricevi ekzempleron de
la afiŝeto. Pli bone estus peti
mem la afiŝon, ĉe la adreso:

Ekonomia Direkcio 'Globus',
Str. Rilski 32,
1000 Sofia, Bulgario.

----- oOo -----

Radio Zagreb.

Ne-rekte ni aŭdis, ke Radio
Zagreb lastatempe dediĉis minuton
por doni ampleksan mencion de la
Fakgrupo. Ni aplaŭdu la inici-
aton de nia Peranto en Jugoslavio
doni adekvatan materialon al la
koncerna redakcio.

La mencio inter alie aludis
al la IKEF-a kunveno en Pekino,
sub la prezido de S-ro Braun.

----- oOo -----

Lastmomenta novaĵero.

La rutinan laboron por tiu ĉi
Novaĵletero transprenis la Ekon-
omikista Grupo de Hungara E.-
Asocio.

Tiu Grupo, (IKEF-24), esperas,
ke la laboro tiel bone iras, ke
la arango regule efektiviĝos.

Ni aplaŭdu kaj danku ilin!

----- oOo -----